



## PILO-PRESS

Internacia  
Informservo

## Pilo-Press

Jara abono 30, -GM Eldonanto/Herausgeber:

Abonado eblas  
je ĉiu semajno!

Ludwig Pickel  
Postfach 2113  
D-85 Nürnberg ↑  
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 32/76 - 9 aŭg 1976

Aperas ĉiusemajne

### Pli ol 300 laboristaj esperantistoj en Gotenburgo

Gotenburgo (pp/sat) - Vendredon, la 30-an de julio 1976, finiĝis la sestaga 49-a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda, al kiu partoprenis 301 laboristaj esperantistoj el 21 landoj.

Sur la programo de la kongreso estis, krom la pridiskutado de la raporto de la diversaj instancoj de la asocio, prelegoj kaj diskutoj pri aktualaj temoj de la nuna tempo; ekz. pri "La subpremo al la terkultivistoj en Latina Ameriko", "La genocido en Burundio" kaj "Evoluo en la legoj pri militrifuzado". Okazis kunvenoj de la frakcioj de la naturamikoj, la mondciuitanoj, la pacistoj, la liberecanoj kaj la junulfako.

En kunveno kun reprezentantoj de la sindikata movado en Gotenburgo prezentiĝis enkonduko pri la svedaj sindikatoj.

La kongreso en sia lasta laborkunsido akceptis ĵenan gvidrezolucion:

### Gvidrezolucio de la 49-a Kongreso de SAT

La 49-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda okazinta en Gotenburgo, Svedio, de la 24-a ĝis 30-a de julio 1976, kiu kunigis 301 laboristajn esperantistojn el 21 landoj, post diskuto kaj aprobo de la raporto:

- denove esprimas sian solidarecon kun la sindikatoj, kiuj laboras por plibonigo de la vivkondiĉoj de la laboristoj, kaj speciale nun kun tiuj de Latina Ameriko;
- kun kontento konstatas, ke plano ellaborata por la eldono de informilo pri Esperanto en sindikataj medioj povas esti la kerno de agadplano, kaj instigas al la membroj helpi realigi la koncernan propagandon en siaj respektivaj sindikataj organizoj;
- kondamnas uzadon de perforto en la interrilatoj de la popoloj kaj lige kun tio pledas por mondvasta malarmado;
- kun indigno energie kondamnas genocidon, kiu daŭre skurĝas la mondon;
- konstatante kun bedaŭro, ke pluraj el la membroj de la organizo ankoraŭ spertas malhelpon en siaj eblecoj por translimaj kontaktoj malgraŭ la subskribo de la finakto en Helsinki en la pasinta jaro, opinias, ke pli efika realigo de la enhavo de tiu deklaro estas necesa kaj atendas agojn tiurilate de ĉiuj laboristaj partioj;
- konstatante kun bedaŭro, ke en multaj landoj rasismo daŭre venenas la publikan vivon, preme gas homgrupojn kaj eĉ kaŭzas mortojn, subtenas la asociojn, kiuj luktas kontraŭ tiu plago;
- esperas ke la membroj sentas sin respondecaj partopreni en aktivadoj en supre nomita senco, tiel ke la enhavo de ĉi tiu rezolucio ne restu surpapera deziresprimo.

La adreso de SAT estas: Sennacieca Asocio Tutmonda, 67, Avenue Gambetta, F-75020 Paris.

## Pri la 61-a Universala Kongreso

Ateno (Pola Radio/pp) - Sabate, la 7-an de aŭgusto, finiĝis la 61-a Universala Kongreso en Ateno. La enhavo de la kongresa rezolucio ne jam atingis nin; ankaŭ Pola Radio ne jam elsendis sonraporton pri la ferma kunsido de la kongreso. Ni, do hodiaŭ povas nur mallonge raportii pri okazaĵoj dum la kongresa semajno, surbaze de sonraportoj de Pola Radio.

Jam meze de la semajno, en intervjuo kun la Pola Radio d-ro Werner Bormann, vicprezidanto de UEA, povis konstati, ke la kongreso kun 1 100 aliĝintaj estas bone vizitata konsiderante la ekstreman situon de Ateno kaj de la relativa malforta greka movado. Ĉiuj kunvenoj laŭ li estis bonaj kaj sukcesaj. En sia antaŭmikroфона parolado d-ro Bormann akcentis, ke dum la trihora diskutado en la 1-a ĝenerala kunveno venis kelkaj konkludoj ankaŭ de la membrara flanko, kaj li elstarigis la kunvenon de la esperantistaj virinoj, al kiu estis invititaj gravaj grekaj virinoj de la publika vivo kaj pri kiu raportis la televido.

Entute la eŝo en la greka publiko estis vasta kaj bona, en televido, radio kaj gazetaro, kiel diris grekaj LLK-anoj. Dum tri horoj 10 ĵurnalisto, kiuj ĉeestis la gazetaran konferencon, demandis pri Esperanto. D-ro Bormann esprimis dankon al la grekaj esperantistoj pro la bona laboro por la kongreso.

Specialan atenton ĉe la kongresanoj trovis la ĉi-jara Internacia Somera Universitato; laŭ Jerzy Grum, la raportisto de Pola Radio, la prelegoj de la ISU "spicis" la erojn de la kongresa programo.

Sonraportojn pri la prelego de William Auld "Lingvo kaj kulturo" kaj pri la podia diskutado "Kiel nuntempe argumenti por Esperanto" sub gvido de estrarano St. Swistak Pola Radio emisios en la venontaj elsendoj. Nova interesa ero estis la demarkonkurso aŭ kvizo sub la gvido de William Auld "Por ke vi sciu".

Detalajn sonraportojn - kun ripetado - elsendis Pola Radio pri la Kunveno de Mondpaca Esperanto-Movado (MEM) kaj pri la Belartaj Konkursoj. La MEM-kunveno enkondukis Renato Corsetti, Italio. Laŭ li ne plu povas validi la slogano de la malnovaj romianoj: Se vi volas pacon, vi pretigu militon. Ĝi nun devas esti: Se vi volas pacon, vi pretigu tiun pacon! D-ro Detlev Blanke, GDR, parolis pri la signifo de la Fina Akto de Helsinki kaj informis, ke ĝi aperis nun en Esperanta traduko en Slovakio. La Fina Akto estas tre kompleksa, ampleksa dokumento, opinii Blanke, kaj poste oni nur parolas pri unu parto, nome pri tiu tieldirita tria korbo, kiu estas tre grava kaj por ni esperantistoj speciale, kompreneble interesa parto, sed oni ne devas forgesi la 10 principojn kiel bazo de internacia kunlaboro.

La rezultojn de la Belartaj Konkursoj prezentis Baldur Ragnarsson, Islando. Laŭ li literaturo estas belarto de la lingvo skriba, kaj malgraŭ certa parola manifestiĝo, la uzo de Esperanto estas unua-kaj dua-vice skriba. La respondo, ĉu Esperanto kreas samnivelajn verkojn kiel naciaj lingvoj, povas esti nur negativa. Tasko de la Belartaj Konkursoj estas trovi novajn talentulojn. Por la ĉi-jara konkurso estis akceptitaj nur originalaj kontribuajoj. Oni ne povas diri, ke la kvalito estas rimarkinda. Poezio ne plu estas adekvata komunikilo por nia tempo. Prozo estas pli taŭga esprimilo. Kompare al la pasinta jaro plimultiĝis kaj plibonkvalitiĝis la konkursaĵoj. La stilo fariĝis ĝenerale pli konkreta, oni evitis "grandajn temojn" kvazaŭ sub nebulecaj ideoj. La nova kategorio "eseoj" estas altkvalitaj, konstatis Ragnarsson.

La komitato de UEA akceptis la aliĝpetojn de du landaj asocioj novaj, nome la Esperanto-Asocion de Suda Koreujo kaj la Centran Laborrondon Esperanto de Germana Demokratia Respubliko.

### Kongreso de blindaj esperantistoj

Graz (pp) - 104 blindaj esperantistoj el 16 landoj partoprenis la 44-an Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj en Stubenberg, 46 km oriente de la aŭstria urbo Graz, sub la lerta gvidado de Harald Rader, de la 24-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1976.

### "Neniu vivanta esperantisto en Sovetunio"?

Vieno. La Esperanto-Elsendo de ORF, Vieno, sciigis kadre de sia programo de la 7/8-08-76 jenan informon:

"Aŭskultinte prelegon de s-ro Nikolai Poljanow, vicĉefredaktoro de la soveta gazeto 'Iswestija', faritan pasintjunie en la aŭstra-soveta asocio, iu membro de nia redakcio demandis s-ron Poljanow pri la stato de Esperanto en Sovetunio. S-ro Poljanow respondis, ke li ja scias pri Esperanto, sed neniam konatiĝis aŭ eĉ nur aŭdis pri vivanta esperantisto en Sovetunio. Ĉu niaj aŭskultantoj en Sovetunio ne atestu pri sia ekzisto, skribante al 'Iswestija'?"

### El Bona Damasko al Bela Nürnberg

Nürnberg (pp) - Atingis nin letero el Damasko, la ĉefurbo de Siria Araba Respubliko, sub la dato de la 30-07-1976. La letero komenciĝas per la salutvortoj: "Fratan Saluton el Bona Damasko al Bela Nürnberg". Skribis ĝin 19-jara studento de la Universitato de Damasko, Tareq Mawsily, kiu komencis lerni Esperanton kaj ankaŭ jam klopodas disvastigi Esperanton en sia lando. "Mi povas esprimi min per vortoj kaj strukturoj, kiujn mi scias plus la helpo de la vortareto", li skribas. Li konatiĝis kun Esperanto el diversaj artikoloj kaj el Encyclopaedia Britannica. Dum unu jaro li klopodos disvastigi Esperanton inter siaj amikoj. La plej multaj el ili rifuzis la tutan ideon, li skribas, sed iu el ili deziras ke li instruu Esperanton al ili.

En januaro ĉi-jare 13 interesuloj renkontiĝis en Damasko kun la intenco fondi la "Araban Sirian Esperanto-Asocion", ili estis tre entuziasmaj, sed, malfeliĉe, ili devis prokrasti la aferon: mankas E-parolanto kaj aktivuloj, mono, subteno ktp.

S-ro Tareq Mawsily petas nun pri lerniloj, revuoj, informiloj kaj volas korespondi. Jen la adreso: Mr. Tareq Mawsily, 7. Mawsily & Dalaty Bldg., St. Al-Mal'ab, Mazra'ah, Damascus, Sirio (S.A.R.)

### Kunveno de nordgermanaj esperantistoj

Westerland/Sylt (pp) - Laŭ interkonsento kun la esperantistoj el Westerland la 23-an kaj 24-an de oktobro 1976 okazos la aŭtuna konferenco de Nordgermana Esperanto-Ligo (NOGELO) kaj Kristana Esperanto-Ligo Internacia (KELI) sur la bela insulo Sylt.

La programo antaŭvidas laborkunsidojn de NOGELO kaj de KELI, publikan aranĝon kun prelego de d-ro Werner Bormann kaj ekumenan diservon en la malnova vilaĝpreĝejo de Westerland. Sed ne mankas rondveturado sub la devizo "Travivi Sylt!" kaj kombinita bus- kaj ŝipveturado al la dana insulo Röm. Aligkotizo por plenkreskuloj 13,- GM, por junuloj 10 GM.

Informojn donas S-ino Hella Lanka, César Klein-Ring 14, 2000 Hamburg 60. Telefono 040/6313838.

### Esperanto-Centro Aarhus

Aarhus (pp) - La Esperanto-Centro Aarhus, kiu malfermiĝis la 1-an de julio ĉi-jare, laŭ sia ĉiusemajna bulteno ECB n-ro 6 sufiĉe bone funkcias. La nova Esperanto-Centro luis butikon - dank' al la oferemo de kluboj kaj individuaj esperantistoj - , en kiu oni ofertas kursojn, librojn, kunvenojn, vojaĝojn ktp. Jen la adreso: Esperanto-Centro Aarhus, Søndre Alle 29, DK-8000 Aarhus C, Danlando.

## Esperanto en Radio

Varsovio. Pri la sonraportoj de la speciala sendito de la Esperanto-Redakcio Varsovio el Ateno ni raportis jam aliloke. Ankaŭ dum la semajntagoj oni povis aŭdi kelkfoje prikongresajn informojn, paroladojn kaj intervjuojn. Tio validas ankaŭ por la kurenta semajno. Kaj kun atento kaj scivolemo la aŭskultantoj atendas la venontan Esperanto-Ekspreson, kiu certe alportos la sonraporton pri la ferma kunsido de la kongreso. La esperantistoj devas vere danki al la Pola Radio, ke ili dediĉas tiom da energio, tempo kaj mono por raporti pri la ĉiujara grava manifestiĝo esperantista. - Dum la unuaj aŭgustaj tagoj multaj programeroj estis dediĉitaj al 1-a datreveno de la subskribo de la Finakto de Helsinki. Oni povis aŭdi multajn pozitivajn eldirojn kaj prijuĝojn. El ĉiuj informoj, komentoj kaj elpaŝoj oni povis gajni la impreson, ke Pollando alte taksas - certe pro diversaj motivoj - tiun finan akton de Helsinki kaj donas al ĝi gravan signifon.

Vieno. La ĉi-semajna komentario estis dediĉita al la katastrofo de la Danuba ponto "Reichsbrücke", kiu "konsternis ne nur la vienanojn, sed - kiel la gazetara eĥo montras - ankaŭ la aliajn aŭstrianojn kaj - plie - la eŭropan eksterlandon, iomete eĉ la transmaran." Verkis la komentario ĉi-foje diplomita komercisto Walter Sonnleitner. La dua parto de la elsendo konsistis el raporto pri la aktiveco de UNIDO, la organizo de la UN por Industria Evoluo, kiu festos la dekan jaron de sia ekzisto en Vieno, kie ĝi havas sian ĉefan sidejon.

De la SAT-kongreso en Göteborg sendis al Vieno salutojn 9 diversnaciaj kongresintoj. Krome alskribis la stacion 17 aŭskultantoj el jenaj landoj: Anglio, Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Francio, FR Germanio, Pollando, Sovetunio kaj Svedio.

Sur ORF-ultra-kurtondo s-ino Charlotte Hube, edzino de d-ro Walter Hube, direktoro de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, kantos en Esperanto akompanate de s-ino Hedy Frimmel-Pohl la tre konatan melodion de Robert Stolz "Du sollst der Kaiser meiner Seele sein" laŭ teksto esperantigita de Hugo Kraus sub la titolo "Animon mian ame regu vi"

Romo. La tekston por la Esperanto-elsendo de Radio Roma preparas kiel antaŭe D-ro Antonio De Salvo, sed antaŭ la mikrofono ĝin prezentas d-ro Renato Corsetti. Malgraŭ kutimaj ĝenoj oni povas sekvi la dimanĉajn elsendojn. De kelka tempo estis enkondukita nova programero, nome moderna kanto en Esperanto. Temas pri muzika kaseto, registrita de roma muzika grupo kun rimarkinda verovo. La tekstoj estas plejparte engaĝitaj, tamen ne pezaj, kaj la muziko estas ĵuneca kaj alloga: apud originalaĵoj, en la kaseto troviĝas tradukoj de konataj kanzonoj kaj de popolaj kantoj plurlandaj, ankaŭ ekstereŭropaj. La kaseto estas privata kreaĵo, kiun la Esperanto-redakcio volonte kaj senprofite reklamas, ĉar ĝi meritas disvastiĝi kiel ekzemplo de populara kaj senĝena muziko en Esperanto. La prezo por la kaseto estas tre proksima al la pura produktokosto, nome la egalvaloro de 3 usonaj dolaroj plus sendokostoj. Mendojn volonte peras la Esperanto-Redakcio de Radio Roma, C.P. 320, I-00 182 Roma, Italio.

Kurtonda Servo de Svisa Radio. Pasintsemajne Claude Gacond intervjuis prof. d-ron Wood el Usono pri lia laboro kiel redaktoro de revuo "La Monda Lingva Problemo". Ĉi-sekve ni publikigas la temojn de la elsendoj venontaj: 9.-14.8.76 D-ro A. Baur, Prelego pri Dunant, la fondinto de la Ruĝa Kruco; Claude Gacond, Intervjuo kun d-ro Wood pri la kreolaj lingvoj. 16. - 21.8.76: D-ro A. Baur, Daurigo de la prelego pri Dunant; Claude Gacond, Intervjuo kun d-ro Wood pri kurtondaj elsendoj kaj lingvopolitiko. Aŭskultu kaj skribu al la radio-stacioj, ankaŭ al Radio Zagreb, Pekino, Sofio, Radio Vaticana, IBRA-radio ktp.!